

Kolokvo pri la adapto de UN al la hodiaŭa mondo
okazinta en Nico (Sudfrancio) la 27/29-ajn de majo 1965, 4-a parto
Claude Gacond, 144-a radioprelego, 1966.07.06 & 1966.07.09

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni daŭrigas la raporton pri la Nica Kolokvo, kiu studis pasintan jaron, kiel Unuiĝinta Naciaro povas adaptiĝi al la hodiaŭa mondo. Ni ĉeestos hodiaŭ la unuan labor-kunsidon.

A.- Tri juristoj raportis pri la rolo de UN por la defendo de la paco kaj pri la progreso de la internacia juro. Kvankam ili devis pritrakti malsimilajn temojn, oni rimarkis pensan unuanimecon. Ili tri opinias, ke la hodiaŭa krizo de UN estas la rezulto de la interregistara malfido.

Cl.- Sinjoro Henri Laughier, eks-adjunkta ĝenerala sekretario de UN, demonstris, ke ne plu ekzistas pure nacia sendependeco, sed ke kontraŭe ĉiuj naciaj problemoj havas internaciajn implikadojn. Pro tio la internaciaj organizaĵoj troviĝas ĉiujare antaŭ pli da laboro. La naciaj registaroj ne akceptis tiun evoluon kaj ilia sinteno malhelpas solvi la urĝajn problemojn.

A.- Sinjoro Laugier menciis la ĉefajn kaŭzojn al tiu hodiaŭa krizo de UN.

Cl.- La monda demografia eksplodo malfavoras la internacian kooperadon.

A.- La milita aplikado de la atomenergio malaktualigis la tekstojn de la Ĉarto pri la monda sekureco.

Cl.- La konfliktoj naskitaj de la malkoloniigo kaj la senkondiĉa akcepto en UN de sesdeko da registaroj de ĵus sendependiĝintaj popoloj.

A.- Abundo kaj malsato, kiuj dividas la homaron en du kontraŭaj naciaroj.

Cl.- La konflikto inter la du granduloj Usono kaj Sovetio, kiun ne antaŭvidis la redaktintoj de la Ĉarto.

A.- Hezitado inter du interpretadoj de la Ĉarto : ĉu universalismo aŭ ĉu obeo al la Homaj Rajtoj.

Cl.- Sinjoro Laugier poste demonstris, ke pro malfido al internacia kooperado multaj preskriptoj de la Ĉarto de UN ne estas aplikitaj. Li citis ekzemple la rajton de la Konsilantaro pri Sekureco supervidi la agadojn de la regionaj internaciaj paktoj. Ĝis nun la artikolo 53, kiu ebligas tiun kontrolon, estis prisilentita. Sinjoro Laugier diras :

A.- *« Vi povas pripensi, imagi kaj juĝi, kio estus okazinta, se tiun rajton pri supervido kaj kontrolo estus uzinta UN, nome de la internacia universala kooperado, super la strukturoj, celoj kaj agoj de la Atlantika Pakto, de la Varsovia Pakto, de la Pacifika Pakto, de la Asocio de Amerikaj aŭ Afrikaj landoj. »*

Cl.- Sinjoro Laugier citis alian gravan volitan forgeson. En 1948 la membro-ŝtatoj de UN akceptis la Universalan Deklaracion pri la Homaj Rajtoj. Ĝis hodiaŭ ili ne trovis la tempon subskribi la paktojn, kiuj devis respektigi la aplikon en la mondo de tiuj Homaj Rajtoj.

A.- Nur premo de la publika opinio iom post iom devigas la registarojn antaŭeniri sur la vojo de internacia kooperado.

Cl.- Poste sinjorino Paule Bastid, profesorino pri juro kaj ekonomio en Parizo, raportis pri la juraj devoj de la membroj de Unuiĝinta Naciaro. Sin konfrontadas tri juraj tendencoj : la kristana, la soveta kaj la neŭtrala. Dum jaroj la soveta tendenco kontraŭis la kristanan mondkoncepton en la debatoj de la Asembleo pri la internacia juro. Hodiaŭ la afrikaj kaj kelkaj aziaj landoj rifuzas ambaŭ tendencojn. Ili reprezentas trian vidpunkton kaj vidas en la

Kolokvo pri la adapto de UN al la hodiaŭa mondo
okazinta en Nico (Sudfrancio) la 27/29-ajn de majo 1965, 4-a parto
Claude Gacond, 144-a radioprelego, 1966.07.06 & 1966.07.09

internacia juro sistemon, kiu ebligis la koloniismon. Neĉeesto de kelkaj registaroj en la Asembleo, kaj ĉefe tiu de Popola Ĉinio, malhelpas la progreson de debato pri internacia juro. Nur vera universaleco ebligos debati la necesajn kompromisojn, kiuj kondukos al jura sistemo kapabla asekuri efektivan internacian kooperadon.

A.- Post tiu tre riĉa raporto, kiun ni provis resumi, raportis sinjoro Charles Chaumont, ĝenerala sekretario en la Akademio pri Internacia Juro en Hago. Li parolis pri la rolo de UN por la konservado de la paco. Pro multaj historiaj kaj psikologiaj kaŭzoj UN ne povis fariĝi superregistara ĝendarmo. Ĝia tasko estas multe pli modesta kaj komplika. Oni ankaŭ ne plu atendas de la kvin granduloj realan ĝendarman rolon. Samtempe la veto-raĵto tendencas ne plu esti uzata de la granduloj. Oni iom post iom komprenas en la diplomaciaj medioj, ke nek UN, nek forta lando povas trudi sian volon al la ceteraj landoj. UN devas vekti traktitajn solvojn interregistarajn. Kiel ambaŭ antaŭaj raportintoj, sinjoro Chaumont citis multajn artikolojn de la Ĉarto, kiuj ĝis hodiaŭ estis forgesitaj aŭ nesufiĉe ekspluatitaj. La Konsilantaro pri Sekureco ekzemple posedas la povon enketi dum pactempo por determini, ĉu ia situacio povus evolui minace al la konservado de la paco.

Cl.- Interesa interŝanĝo de vidpunktoj sekvis tiujn tri raportojn. Ĝenerala opinio estas, ke antaŭ ol esti reformita, la Ĉarto de UN devos esti unue honeste uzata. Ĝin subskribante la membroŝtatoj sin jure ligis al Unuiĝinta Naciaro. Nur manko de publika reago ebligis ĝis nun al tiuj membroj eviti siajn responsecojn. Sed hodiaŭ multaj neregistaraj tutmondaj movadoj pli atente sekvas la debatojn en UN. Ili eĉ ofte proponas novajn solvojn aŭ ideojn kaj tiel ekludas decidigan rolon.

A.- Pri la aliaj kunsidoj en la Nica Kolokvo ni raportos dum la venontaj elsendoj.

Cl.- Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-